

JENI

Novembro-December 1985

Informo por kaj pri la Junularo Esperantista en Usono

Volumo 1, Numero 4



“Mi suspektas ke ni ne plu estas en Kansaso, Totol!”

Jes ja, Doroteo, vi pravas. Vi situas ne ĉe Onklo Henriko kaj Onjo Ema, sed inter la paĝoj de la JEN-Bulteno. Baldaŭ vi eniros hantatan arbaron, kie atendas vin la Kastelo de Kabe, bando de bandaĝitaj banditoj, timigaj poemoj, kaj aliaj aventuroj. Do, kunigu la geamikojn, kaj ek al— simple sekvu la flavbrikan vojon. . . .

La redakcio de JEN-Bulteno ricevis kontribuaĵojn nur de du homoj. Ni donas la unuan premion por la sekva poemo pro la evidenta dediĉo de la aŭtoro al la Zamenhofaj idealoj. Gratulojn, Brian McCullough!

**Pri Eterne Amindumema (?)
Eterna Komencanto**

Diboĉas ja li Esperante,
Kvankam lingvon li lernas nur lante—
Verdulinoj rezistas,
Sed li nur persistas,
Kiel guto, konstante frapante.

La dua poemo, verkita de Amri Wandel, ankaŭ meritas aperon en nia bulteno, kaj sendube instigos vin partopreni la SFSU-Kursojn:

Moderna Edukado
Esperanton per brila klopodo
Li instruis laŭ plej nova modo
Sed kun inoj li svate
Ekzercadis private
Ĉiam nur laŭ la rekta metodo.



Triviala Moto de la redakcio: Konforme al la tono de la limerik-arto, ni diru, ke S-ro Wandel bedaŭrinde ne instruos venontjare ĉe SFSU ("Domaĝe!," suspiras pluraj inoj apude—kaj ankaŭ unu-du viroj—ni ja situas en San Francisco!); sed alia adepto de la "rekta metodo," S-ro Nikola Rašič el Jugoslavio, lin anstataŭos. S-ro Rašič utiligos la t.n. Zagreban Metodon, kies ekzotikeco eble eĉ pli plaĉos al diboĉemuloj. Se vin interesas tia vere stimula somerferio en Esperantujo, bv. skribi al: Cathy Schulze, la oficiala "parigisto" por la SFSU-Kursoj, 410 Darrell Road, Hillsborough CA 94010.

Dum Senkrokiligaj Semajnfinoj ĉe Yosemite (Josimiti) Instituto ĉe la marbordo de la Pacifika Oceano kutime multaj bonaj kaj diversaj aferoj okazas: la lernado de Esperanto, la rekunveno de malnovaj amikoj, kaj ĝenerale bonaj okazaĵoj. Sed dum la ĵus pasinta Senkrokiliga Semajnfino tre grava io alia okazis, nome la formado de la regiona junulara organizo JESA (Junularo Esperantista de la San-Franciska Areo). Tio eble je la unua ekrigardo ne ŝajnas aparte grava, sed vere ĝi estas, ĉar sen ĝi, kaj la estontaj formadoj de aliaj similaj, la ŝanco por la longa daŭro de JEN ne estus tiel granda. Kial? Pensu momente pri la tri necesaĵoj de forta junulara movado: disvastigo de informo pri Esperanto, edukado de Esperanto, kaj okazo por uzi Esperanton inter kamaradoj. Por junuloj la unuajn du necesaĵojn la jam ekzistantaj organizoj bone plenumas (kvankam ni bone helpos!), sed sen nia organizo ekzistus granda manko ĉe la tria. Ni hazardas ke la plejmulto de la nejunulara aktiveco en Usono okazas ĉe regionaj organizoj. Fakte, la vasteco de Usono necesigis la nunan formon de tiaj organizoj subtenantaj la nacian organizon ELNA. Do, la esto de junulara analogo de tiu bona sistemo fortigas la junularan movadon, kaj tial la Esperantan movadon. Tiel ni aktivaj junuloj povas ludi tre gravan rolon, kaj doni multan esperon al esperantoj ĉie.

Por pli da informo pri JESA kaj la organizado de junulara loka Esperanto-Movado en Usono, skribu al: JESA, 3685 S. Bascom Avenue #39, Campbell CA 95008.

Anoncoj

Korektinda: en la lasta numero de la JEN-Bulteno, ni raportis, ke Curt Ford estas la prezidanto de SFERO. Fakte, estas du—Curt Ford kaj Liz Warner, ambaŭ membroj de JEN.

Dum la novembra kunveno de JESA oni diskutis la planon trovi "ĝemelan" junularan Esperanto-Organizon alilande. Oni pli diskutos la aferon ĉi-jare. Raporto aperos en la JEN-Bulteno.

Niaj Pioniroj—"Kabe"



Kabe (D-ro Kazimierz Bein), polo, okulkuracisto. Naskiĝis en 1872. En siaj junaj jaroj li miksiĝis en kontraŭrusan movadon, pro kio li estis ekzilita por pluraj jaroj. Tial nur en 1899 li finis la medicinan fakultaton en Kazan. Li verkis multajn prifakajn librojn kaj artikolojn, fondis la Varsoviajn Instituton por Okulmalsanoj, kies direktoro li estis dum multaj jaroj, kaj la Polan Oftalmologian Societon. Li estas konata kiel amatora foto-artisto.

En la Esperanta mondo li famiĝis sub la pseŭdonomo Kabe, per la traduko de la Fundo de l' Mizeroj de Sieroszewski, kiu aperis en Lingvo Internacia en 1904. Ekde 1906 li estis vicprezidanto de la Akademio. En 1911 li forlasis la movadon, kaj de tiam tute ne okupiĝis plu pri Esperanto. La motivoj de ĉi tiu decido estas ankoraŭ neklaraj, verŝajne kontribuis en tio ankaŭ personaj kaŭzoj (malpaciĝo kun Grabowski, Zakrzewski kaj aliaj), sed aliparte estas nekompreneble, ke lokaj kaŭzoj difinu ies sintenon al tia vaste internacia afero, kia estas Esperanto.

Intervjuate en 1931, li parolis pri neprogreso de Esperanto, kiun li ne rigardis solvo de la internacia lingva problemo. Laŭ tio ĉi, do, lian "Grandan Rezonon" motivus principaj konsideroj. Kia ajn estis la kaŭzo de lia retiriĝo, la Esperantistaron vigle okupis ĉi tiu neordinara sinteno, ke iu, ĉe la kulmino de sia Esperantista gloro, riĉiginte la lingvon per gravaj laboroj kaj eksterordinara influo, subite, en siaj junaj jaroj, turnas por ĉiam la dorson al la kampoj de siaj riĉaj rikoltoj. Lia nomo fariĝis kvazaŭ la simbolo de

apostateco—aŭdante pri "kabeoj," la Esperantistoj scias, pri kiuj temas.


La du ĉefverkoj de Kabe estas: Vortaro de Esperanto (vortaro Esperanta, en kiu la Esperantajn vortojn li difinas, tre klare, tre trafe, en la eleganta maniero) kaj la traduko de La Faraono, granda romano de Prus.

La granda merito de Kabe estas lia influo rilate al la evoluo de la Esperanta prozostilo. Lia lingvaĵo estas pura, klara, simpla, vere eleganta, libera de ĉiu naciismo: la "spirito de la lingvo" vivas en lia stilo plenspire kaj sendifekte. Liaj frazoj estas perfekte ekvilibritaj, ĉiu vorto sur sia ĝusta loko. Mankas ĉiu nenecesa komplikaĵo aŭ trologikaĵo; ekz., li preskaŭ ĉiam evitas la kompleksajn verboformojn (estas -inta, estis -anta). Li skribas vere internacian Esperanton, lingvon agrable glatan, lude legeblan. Li mem klarigas tion, en la supre nomita intervjuo, per sia plurlingveco. Laŭ li: "por havi bonan stilon nepre estas necese koni minimume tri diversajn lingvojn." Ĉi tiu nepre estis vera por la unua periodo de la lingvo, kiam Esperanto ne havis ankoraŭ propran spiriton kaj oni ĝin devis krei, sed ĝi pli kaj pli perdas sian signifon per la iom-post-ioma kompletiĝo kaj memstariĝo de la lingvo.

Originale li ne verkis. Laŭ lia opinio, "la lingvo profitas pli multe per la tradukado, ol per libera originala verkado. La originala verkisto ĉiam iel povos eltiri sin, li simple ne uzos malfacilajn esprimojn aŭ simple donos aliajn anstataŭ ili." Same prava opinio; sed aliflanke la lingvo certe bezonas ankaŭ originalajn verkistojn, kiuj, eĉ se ili malpli evoluigos la lingvon mem, uzos kaj per tio sankcios kaj fiksos la profiton akiritan de la tradukistoj.

Kabe reinteresiĝis pri Esperanto en 1957. Li mortis en 1959.

(La ĉi-supra artikolo plejparte estas la verko de Kalocsay en la Enciklopedio de Esperanto.)



Ĉu la Muzoj Estas Esperantigeblaj? Eseo far Bernard Golden

Mi ofte rimarkis en publikigitaj Esperantaj tekstoj, ke aŭtoroj diversmaniere traktas proprajn nomojn. Kelkfoje tiuj ĉi aperas nur en la originala formo, se la lingvo, de kiu ili venas, uzas la latinan alfabeton: George Orwell (angla), Antonín Dvořák (ĉeĥa). Se la alfabeto de la koncerna lingvo estas la kirila aŭ unu el la orientaj skribsistemoj, la nomo nepre estas transliterita per la Esperanta alfabeto: Jurij Andropov (rusa), Teng Ksiao-ping (ĉina).

Ĉar neniu povas scii, kiel prononci ĉiujn nomojn venantajn de la plej diversaj lingvoj uzantaj la latinan alfabeton, kelkaj verkantoj kaj redaktoroj provas fonetike prezenti la prononcon helpe de literoj de la Esperanta alfabeto: Albrecht Dürer (Albreĥt Direr), Karol Wojtyła (Vojtiŭa). Tio estas kompromisa solvo, ĉar la Esperanta alfabeto ne estas sufiĉe granda por enhavi ĉiujn sonojn de ĉiuj lingvoj.

Tria maniero trakti personajn nomojn estas per asimilado aŭ esperantigo. Ĝi estas rimedo tradicie uzata por nomoj de homoj, kiuj ludis gravan rolon en la historio kaj la literaturo: Moseo, Herodoto, Cezaro, Konfuceo, Donkiĥoto. Ŝajnas, do, kontraŭprogresiva tendenco ne uzi tiajn asimilitajn formojn, se ili jam dum jardekoj aperis en Esperantaj verkoj kaj, cetere, estas registritaj en vortaroj. Jen ekzemplo de tiu kritikinda lingvouzo:

"Inter arma silent Musae!"—admonas nin la latina sentenco. Vere: inter la armiloj silentas la Muzoj. Ne donas fruntokison la protektanto de la eposo, la 'bele parolanta' Muzo Kalliope; silentas la Muzo de la tragedio, la trista Melpomene; same silentas la gaja Thaleia, kiu protektas la komedion; ne preĝas la pia Pilyhymnia, la inspiranto de la himnoj; kaj bedaŭrinde estas muta la amorema Erato, la Muzo de la ampoezio...." (Budapeŝta Informilo, februaro 1985, pĝ. 2)

La verkinto transliteris la originalajn helenajn nomojn de kvin el la naŭ Muzoj, sen indiki la prononcon de la ne-Esperantaj literoj "y" kaj "th". Tamen, en la artikolo "Muzoj" en Plena Ilustrita Vortaro ĉiuj Muzoj estas listigitaj laŭ siaj asimilitaj formoj:

Eratoa (amliriko), Eŭterpa (muziko), Kaliopa (eposo), Kliao (historio), Melpomena (tragedio), Polimnia (altliriko), Talia (komedio), Terpsikora (danco), Urania (astronomio). Estas, do, neniu kialo ne uzi tiujn esperantigitajn nom-formojn, kiu donas al tekstoj en Esperanto pli homogenan aspekton.

Nota de la redaktoro: S-ro Golden loĝis originale en Usono kaj enmigris Hungarion antaŭ multaj jaroj. Ni dankas al li pro lia afabla kontribuo al la JEN-Bulteno. Espereble, pli da usonaj junuloj ankaŭ komencos kontribui al sia propra organo.

La Mirinda Sorĉisto de Oz

de L. Frank Baum
Tradukis H. R. Dreyer

Ĉapitro I—La Ciklono

Dorotea loĝis en la mezo de la vastaj Kansasaj ebenaĵoj, kun Onklo Henriko, kiu estis farmisto, kaj Onklino Ema, kiu estis la edzino de la farmisto. Ilia domo estis malgranda, ĉar la ligno por konstrui ĝin devis esti portata multe da mejloj per ŝarĝveturilo. Estis kvar muroj, planko kaj tegmento, kiuj konsistigis unu ĉambron; kaj ĉi tiu ĉambro enhavis rustiĝintan fornon, ŝrankon por la manĝiloj, tablon, tri aŭ kvar seĝojn, kaj la litojn. Onklo Henriko kaj Onklino Ema havis grandan liton en unu angulo. Tiu ne estis subtegmento, kaj neniu kelo krom el malplenaĵo nomita ciklono-kelo, kien la familio povus iri okaze de unu el tiaj granda ventoturniĝoj, sufiĉe forta por premege ian konstruaĵon en sia vojo.

Kiam Dorotea staris en en la pordokadro kaj ĉirkaŭrigardis, ŝi povis vidi nenion krom la grandaj grizaj ebenaĵoj ĉiuflanke. Nek arbneko domo interrompis la larĝan amplekson de ebena lando kiu atingis la randon de la ĉielo en ĉiuj direktoj. La suno estis bakinta lplugitan teron en grizan mason kun fendeto. Eĉ la herbaro ne estis verda, ĉar la suno bruligis la suprojn de la folioj ĝis ili havis la saman grizan koloron kiu estis ĉie vidata. Iufoje la domo estis kolorigita, sed la suno bruligis la farbojn, kaj la pluvoj forlavis ilin. Nun la domo estis tiel malbrila kaj griza kiel ĉio alia.

Kiam Onklino Ema alvenis tien por loĝi, ŝi estis juna, beleta edzino. La suno kaj la ventŝanĝis ankaŭ ŝin. Ili forprenis la ekbriletadon el ŝiaj okuloj kaj lasis ilin seriozaj kaj grizaj; ili forprenis la ruĝon de ŝiaj vangoj kaj lipoj, kaj ili ankaŭ estis grizaj. Ŝi estis maldika kaj malgrasega kaj ŝi neniam plu ridetis. Kiam Dorotea, kiu estis orfo,

unue venis al ŝi, Onklino Ema estis tiel surprizita pro la ridado de la infaneto, ke ŝi ekkriis kaj premis la manon sur la koron, kiam ajn la gaja voĉo de Dorotea atingis ŝiajn orelojn; kaj ŝi ankoraŭ rigardis la knabinecon kun miro, ke ŝi povas trovi ion priridinda.

Onklo Henriko neniam ridis. Li forte laboris de mateno ĝis vespero kaj neniam sciis, kia estas ĝojo. Ankaŭ li estis griza, de la longa barbo ĝis la krudaj botoj, kaj li aspektis serioza kaj severa, kaj malofte parolis.

Estis Toto kiu ridigis Dorotean, kaj konservis ŝin de la grizigado de la aliaj ĉirkaŭaĵoj. Toto ne estis griza; li estis malgranda nigra hundo, kun longaj silkaj haroj kaj nigraj okuletoj kiuj trembrilis gaje sur ĉiu flanko de sia ridinda nazeto. Toto ludis dum la tuta tago, akj Dorotea ludis kun li kaj amis lin treege.

Hodiaŭ, tamen, ili ne ludis. Onklo Henriko sidis sur la pordoŝtupo kaj zorge rigardis la ĉielon, kiu estis eĉ pli griza ol kutime. Dorotea staris ĉe la pordo kun Toto en la brakoj, kaj ankaŭ rigardis la ĉielon. Onklino Ema purigis la manĝilojn.

De la malproksima nordo ili aŭdis mallaŭtan vekiĝon de la vento, kaj Onklo Henriko kaj Dorotea povis vidi kie la longaj herberoj kliniĝas kiel ondoj antaŭ la venonta ŝtormo. Nun venis akra fajfado en la aero el la sudo, kaj dum ili turnis la okulojn tien, ili vidis ondetojn en la herbaro ankaŭ en tiu direkto.

Subite Onklo Henriko ekstaris.

"Ciklono venas, Ema," li vokis al la edzino. [Mi iras prizorgi la brutaron." Tiam li kuris al la brutejoj, kie la bovinoj kaj la ĉevaloj loĝis.

Onklino Ema forlasis la laboron kaj venis al la pordo. Ekrigardo montris la proksimiĝantan danĝeron.

"Rapidé, Dorotea, ekkuru al la kelo!"

Toto eksaltis el la brakoj de Dorotea kaj kaŝis sin sub la lito, kaj la knabino ekpenis rekapti lin. Onklino Ema, terurigita, ekmalfermis la klapon en la planko kaj malsuprengrimpis en la malluman truon. Dorotea finfine kaptis Toton, kaj eksekvis la onklinon. Kiam ŝi estis duone trans la planko, ekvenis granda ventkriego kaj la domo skuiĝis tiel forte, ke ŝi perdis la piedtenon kaj eksidiĝis sur la plankon.

Tiam okazis stranga afero.


La domo ĉirkaŭkiriĝis du- aŭ trifoje kaj leviĝis malrapide tra la aero. Dorotea eksentis kvazaŭ ŝi supreniras per balono.

La norda kaj suda ventoj renkontiĝis kie la domo staris, kaj faris, ke ĝi estus la ĝusta centro de la ciklono. En la mezo de ciklono, la aero estas ĝenerale kvietita, sed la granda premo de la vento sur ĉiun flankon de la domo levis ĝin pli kaj pli alten ĝis ĝi estis ĉe la supro de la ciklono; kaj tie ĝi restis kaj estis forportata multe da mejloj tiel facile kiel vi povas porti plumon.

Estis tre mallume, kaj la vento ululis terure ĉirkaŭ ŝin, sed Dorotea trovis, ke ŝi rajdis tre komforte. Post la unuaj kelkaj kirloj, kaj unufoje kiam la domo tre kliniĝis, ŝi sentis ke ŝi estas milde lulata, kiel bebo en lulilo.

La afero ne plaĉis al Toto. Li kuris ĉirkaŭ la ĉambron tien kaj reen, laŭte bojante; sed Dorotea sidis senmove sur la planko kaj atendis, kio okazos.

Unufoje, Toto tro proksimiĝis al la malfermita klappordo, kaj elfalis; kaj unue la knabineco pensis, ke ŝi perdis lin. Sed baldaŭ ŝi vidis unu el liaj oreloj elstaranta tra la truo, ĉar la forta premo de la aero subtenis lin tiel ke li ne povis fali. Si rampis al la truo, kaptis lin je la orelo, kaj retrenis lin en la ĉambron, poste fermante la klappordon, por ke ne okazu pluaj akcidentoj.



Horo post horo forpasis, kaj malrapide Dorotea venkis sian timon; sed ŝi sentis sin tre soleca, kaj la vento ululis tiel laŭte ĉie ĉirkaŭ ŝi, ke ŝi preskaŭ surdiĝis. Unue ŝi sciivolis, ĉu ŝi disrompiĝos kiam la domo refalos, sed ĉar la horoj pasis kaj nenio terura okazis, ŝi ĉesis turmentiĝi kaj firme decidis atendi trankvile por vidi kion portos la estonteco. Fine ŝi rampis trans la ŝanceliĝantan plankon al sia lito kaj kuŝiĝis sur ĝi; kaj Toto sekvis kaj kuŝiĝis apud ŝi.

Malgraŭ la ŝanceliĝado de la domo kaj la ululado de la vento, Dorotea baldaŭ fermis la okulojn kaj profunde ekdormis.

Noto de la redakcio: La ĉi-supra eltiraĵo estas el la traduko de la *Misard of Or*, unu el la klasikaĵoj de usona infana literaturo. Ĝin tradukis Hal Dreyer, la arkivisto de ELNA, kiu afable permesis nin aperigi la ĉapitron en nia bulteno.

Ekscita, amuza, informa— CompuServe Inform-Servo estas facile uzbla, interaktiva, videoteksta komputila reto kiu celas precipe la uzantojn de personaj komputiloj. Por aktuala novaĵo, veter-prognozo, sportoj, vojaĝoj, informo pri la borzo, ludoj, kaj eĉ la lernado de Esperanto, oni bezonas nur komputilon, modemon, telekomunikacion programon, kaj telefonon. Ĉi-sube, ni priskribos la historion de la servo kaj la lastatempan aperon de sekcio pri Esperanto en CompuServe, la plej ampleksa komputila reto por personaj komputiloj en Usono.

Historia Skeĉo

CompuServe komenciĝis en 1969 en Columbus, Ohio, kiam malgranda asekur-kompanio ekkonsideris la uzon de komputiloj. La kompania estraro, ne tute certa pri la kapabloj de komputiloj, dungis spertulojn, por ke ili esploru kaj determinu la koston por munti daten-procezan fakon en la kompanio.

La fina raporto, preparita de 25-jara inĝeniero, indikis, ke tia fako malgajnus monon dum la unua jaro.

Malgraŭ la iom negativa rezulto de la raporto, la ĉefo de la kompanio aprobis la planon. La inĝeniero, Jeffrey M. Wilkins, konvinkis kelkajn kunlaborantojn helpi lin kunfandi tiun ĉi novebakitan "komputilan" entreprenon. Komence, ili komencis la agadon, luante la part-tempan uzon de lokaj komputiloj.

Post pli ol dek kvin jaroj, Wilkins kaj liaj teknikaj fakuloj restas la kerno de la estrada teamo kiu kondukis la malgrandan filion al nacia famo, ĝin establante elstara alt-teknika kompanio.

CompuServe, bazita en Columbus, nun havas la naŭan rangon inter aliaj similaj komputil-servoj en Usono kaj atingis enspezojn de pli ol \$37,000,000 en 1982. Ĝi kreskas po 20% jare. Laboras en la kompanio pli ol 500 dungitoj, el kiuj la plejparto laboras ĉe la korporacia centro en Columbus, Ohio. Situas en la komputila centro preskaŭ 30 komputilejoj de la marko "Digital Equipment Corporation." En 1975 CompuServe disiĝis de la fonda kompanio kaj fariĝis aparta publika kompanio kun aĉeteblaj akcioj. En 1980 CompuServe unuiĝis kun H&R Block kiel filio.

Nuntempe, CompuServe atingas proksimume 300 urbojn en Usono per sia rekta telefon-reto kaj ankaŭ centojn da aliaj urboj per ne-rektaj retoj kiel Tymnet kaj Telenet.

La CompuServe—a sekcio pri Esperanto troviĝas kadre de la t.n. "Good Earth" Forumo. Ĝin fondis James Deer, ELNA-Komisiito pri komputiloj, en 1984. La sekcio okazigas "konferencojn" la unuan kaj trian sabaton de ĉiu monato je la 6a ptm. (Pacifika tempo). Temoj de la konferencoj anonciĝas antaŭ la koncerna dato. Alitempe, oni povas studi Esperanton kaj trovi informon pri ELNA en la sekcio kiu enhavas kompletan kurson por komencantoj. Por atingi la Esperantan sekcion, enigu la kodon "GO HO 145" je la apero de la komenca CompuServe-instiga signo ("prompt"). Enirinte la "Good Earth" Forumon, elektu sekcion 7, kaj vi trovos vin subite en la familiara mondo de Esperantujo, kie vi povas fari pliajn elektojn pri lecionoj, helpiloj, ktp. Anoncende estas, la konferencoj estas tute en Esperanto.

Kroma avantaĝo por membroj de la Esperanta sekcio kaj por ĉiuj abonantoj de CompuServe estas la t.n. "elektronika poŝto". Uzantoj rajtas sendi elektronikajn leterojn al aliaj CompuServe-abonantoj: Esperantisto en Los Angeles, do, povas facile kaj rapide sendi "leteron" al Esperantisto en Novjorko. Kutime, tia letero atingas la celitan homon post nur 15-20 minutoj.

Ĝis nun, la aktivaj partoprenantoj de la Esperanta sekcio restas malmultaj. Plejparto ĉi tio ŝuldiĝas al la fakto, ke informo pri la sekcio restas ne disvastigita inter usonaj Esperantistoj. Espereble, ĉi tiu artikolo instigos junajn Esperantistojn en Usono kunlabori por plifortigi la sekcion kaj evoluigi ĝiajn potencojn kaj praktikajn uzojn.

Por Plia Informo

La amplekso de ĉi tiu artikolo, kompreneble, estas necese limigita. Por pli da informo pri la Esperanta sekcio de CompuServe, kontaktu: James Deer, 11905 SW Settler Way, Beaverton OR 97005, (503) 643-2252. Dezirante plian informon pri la reto CompuServe kaj kiel aboni la servon, skribu al: CompuServe, 5000 Arlington Centre Blvd, Columbus OH 43220, (614) 457-8600. Ofte, kiam oni aĉetas modemon aŭ telekomunikacion programon, oni ricevos provizoran, enkondukan abonon al CompuServe. Enketu ĉe via loka komputila butikoj pri la eblecoj. Se vi jam estas abonanto de CompuServe, vi povas kontakti James Deer per lia CompuServe—a identiga numero, 74176, 2601. La baza kosto de CompuServe estas kontraŭ la tempo de ligado al la servo: \$6-\$12 hore depende de la horo kaj la modema rapido (300-1200 baud). Al tio oni devas aldoni la koston de la telefonado, se tiaj tarifoj validas por via regiono.

—far Gregory Wass

Historio de TEJO: Parto III

Norberto Saletti

Ekde 1964, la ekstera agado ricevis apartan atenton de TEJO, kies agado fariĝis pli kaj pli profesinivela; ekeldoniĝis informiloj en naciaj lingvoj (ĉefe en la angla kaj franca lingvoj), kaj oni starigis konstantan fakon de eksteraj rilatoj, por teni pli striktajn kontaktojn kun neesperantistaj junularaj organizoj. En tiu ĉi tempo, kaj en tiu ĉi agadpolitiko, komenciĝis la serio de la seminarioj de TEJO. Ties celo estis, unue, diskutigi pri la lingva problemo reprezentantojn de NEJoj, kaj, due, interŝanĝi spertojn. La unua tia seminario okazis en septembro 1965, en Ljubljana, Jugoslavio. En 1966 ekorĝaniziĝis apartaj seminarioj, kies celo estis transdoni spertojn de unu generacio al alia; tiuj seminarioj malfermiĝis ankaŭ al reprezentantoj de NEJoj, tiel pruvante la kompletecon de TEJO, kiel asocio kiu ne nur kapablas pritrakti la propran ĉeftemon, sed same kapablas konsili aliajn pri la plej efikaj manieroj agadi.

La financaj problemoj de TEJO kulminis en 1966 kun la plej alta defecito en ties historio, kvazaŭ simbolo samjare kun la plej sukcesa LJK, tiu de Pécs, Hungario, kiun partoprenis pli ol 900 gejunuloj. Dum tiu ĉi epoko floris la labortendaroj, kadre de kiuj oni instruis Esperanton al la partoprenantoj: ankoraŭ hodiaŭ TEJO organizas tiajn labortendarojn, kunlabore kun la lokaj sekcioj.

Por helpi la vojaĝemon de la junuloj, kaj favori la interŝanĝon de homaj spertoj, naskiĝis en Argentino, en 1966, la "Programo Pasporto," kiu, kelkajn jarojn poste, naskis la Pasportan Servon, pri kiu oni legu poste. En tiu ĉi sama, tre profitodona periodo, TEJO iĝis koresponda membro de la Kunordiga Komisiono pri Internacia Volontula Servado ĉe Unesko (KKIVS). La kunlaboro inter TEJO kaj UEA plifirmiĝis, kaj la Centra Oficejo de UEA transprenis rutinajn taskojn pri la administrado de TEJO. La defecito malaltiĝis, ankaŭ danke al varbado tre efika, sed la socian agadon daŭre bremsis financaj malfacilaĵoj.

Venontnumere aperos Parto IV:
TEJO kaj la sociaj ŝanĝoj de la 60-aj jaroj

Ba!

Rakonto far John Hench

Imagu sur la ŝoseo ke policano ĵus haltigis grandan kamionon.

"Pardonu sinjoro, sed mi devas kontroli vian ŝoforo-permesilon."

"Kial? Mi veturis po la ĝusta rapido."

"Vi pravas, sed mi volas averi vin pri krimula grupo, kiu ŝtelas tiajn kamionojn, kiajn vi nun veturigas. Ĉi tiu bandaĉo timigas la tutan urbon."

"Ho ve, mi certe gvatos ilin. Sed kiel mi rekonas ilin?"

"Do, unue, ili estas junuloj."

"Jes, la tipa bandaĉo."

"Kaj ili devenas de la urbo Ban'."

"Bone, la bandaĉaj banditoj estas Bananoj."

"Prave. Ankaŭ ĉar ili estas bankrotaj, ili rabokaptas kamionojn."

"Mi klarigu tion. La bandaĉa bankrota bandaĉo de Ban' bezonas kontrabandon."

"Jes. Ho, mi preskaŭ forgesis. Unu el la bando, la malplej bonŝanca, estis vundita en pafado, do li portas bandaĉon."

"Kiel li aspektas krom la bandaĉo?"

"Mi opinias, ke li estas el Hindujo."

"Ĉu bengalo?"

"Estas strange, sed mi kredas ke, vi pravas."

"Ĝi ne surprizas min. Do, la bandaĉa, bankrota bandaĉo de Ban' kun la malbenita bengala bandito bandaĉita pro kontraŭbandaĉo bezonas kontrabandon. Kaj mi divenu. La kontrabando estas ŝarĝo da bananoj. Ĉu bananoj bone kunbantiĝitaj per buntaj bendoj?"

"Ĉu oni jam informis vin?"

"Nomu ĝin bonŝanca diveno. Do, lastfoje, la bandaĉa bandaĉo bankrota de Ban' kun la malbenita begala bandito bandaĉita pro kontraŭbandaĉo bezonas kontrabandon da bananoj bone kunbantiĝitaj per bunta bendo."

"Precize. Ĉu vi povas memori tion?"

"Ho jes. Estas banale!"



Letero de la Redaktoro

Feliĉe, pli da JEN-anoj kontribuis al la numero de la JEN-Bulteno nun en viaj manoj. Ni elkore dankas. Ĉi tiu bulteno ne daŭros sen la fidela helpo de la membraro. Do, ne ripozu sur viaj laŭroj! Ĉu verke, ĉu traduke-iel kontribuu. La redakcio, kompreneble, povas facile uzi artikolojn eltiritajn el aliaj periodaĵoj. De tempo al tempo ni tion jam faris. Sed plej grave estas, ke la membraro de JEN kunlaboru por garantiĝi la pludaŭron de oficiala organo, kies ĉefaj karakterizaĵoj estas ĝia originaleco, ĝia rolo kiel voĉo de la junulara Esperantistaro en Usono. Fojon post fojo, partoprenantoj de la LJK en FR Germanio en 1985 menciis, ke ili alte taksas kaj bonvenigas la novan aperon de usonaj junuloj en la internacia Esperanto-Movado. Ni kunligu niajn fortojn kun tiuj en ekster-eŭropaj landoj, kiel la japano en la lasta numero de la JEN-Bulteno kiu volas maleŭropecigi la LJKojn, kaj dividu niajn revojn kaj vidpunktojn kun la samideanoj en Eŭropo.

Plilaŭtigu, do, nian voĉon— partoprenu plene en la vivo de JEN kaj ties organo.

Feliĉan kaj sukcesan novjaron!

Konstanta Adreso

JEN/ELNA
P.O. Box 1129
EL Cerrito, CA 94530

ELNA Komisiito pri
Junularaj Aferoj:
James F. Cool
137 N. Mulberry Street
Wilmington, OH 45177

Kalendaro

1986 marto 21-23:

La 19a Tut-Kalifornia Esperanto-Konferenco (TKEK), Santa Barbara CA. Ok interkona vespero vendredon, publika diskuto, bankedo, aŭkcio, distraĵoj, vizito lokaj vidindaĵoj de Santa Barbara, la Eder de Kalifornio. La konferencejo estas en la Holiday Inn, kie troviĝas naĝejo, manĝejo. Apud du grandaj butikaroj. Transporto havebla de la flughaveno. Infanoj rajtas partopreni senpagaj. . Kontakto por plia informo: Dorothy Holland, 4710 Dexter Dr #3, Santa Barbara CA 93110.

1986 junio 30 - julio 18:

San Francisco State University 17a Esperanto-Kursoj. Kontakto: Cathy Schulz 410 Darrell Road, Hillsborough CA, 94010. Telefono: (415) 342-1796.

1986 julio 18-23:

34-a ELNA-Kongreso, SFSU, San Francisco CA. Kontakto ELNA por detaloj.

1986 julio 26 - aŭgusto 2:

71-a Universala Kongreso de Esperanto, Beijing, PR Ĉinio.

JEN BULTENO

novembro-decembro 1985

Vol. 1, numero 4

Redaktis & kompostis: Gregory Wasson
Eldonis: Junularo Esperantista de Nord-Ameriko

Ĉiujn manuskriptojn, desegnaĵojn, ktp., bonvolu sendi al la konstanta adreso de JEN/ELNA redaktoro rezervas la rajton lingve kontroli aŭ rifuzi ĉiujn sendaĵojn.